

Lætare, cælum, desuper

Brevier-Himno

Paska tempo > antaŭ Ĉieliro > horo de la legaĵoj > laŭplaĉe post la paska oktavo labortage

*Lætare, cælum, desuper,
aplaude, tellus ac mare:
Christus resurgens post crucem
vitam dedit mortalibus.*

Ĉiel', aplaŭdu, ĝoju do,
aplaŭdu, ter', aplaŭdu, mar':
Post Sia kruc' leviĝas Krist',
la viviganta viv' de l' mond'.

*Iam tempus acceptum redit,
dies salutis cernitur,
quo mundus Agni sanguine
refulsit a caligine.*

Revenas jam la ĝusta temp',
videblas jam la tag' de l' sav',
kaj per la sango de l' Ŝafid'
la mond' ekbrilas post mallum'.

*Mors illa, mortis passio,
est criminis remissio;
illæsa virtus permanet,
victus dedit victoriam.*

Per ĉi sufer', ĉi kruca mort',
pardonon trovas ĉiu krim'.
Per malforteco fortas Fort',
kaj venkon donas la Venkit'.

*Nostræ fuit gustus spei
hic, ut fideles crederent
se posse post resurgere,
vitam beatam sumere.*

Li mem, bongusto de l' esper',
fariĝis nia firma fid',
ke ankaŭ ni post releviĝ'
jubilos en beata viv'.

*Nunc ergo pascha candidum
causa bonorum talium
colamus omnes strenue
tanto repleti munere.*

Ho, kia riĉa Dia don'!
La Paskon ni celebru nun,
la kaŭzon de tioma bon',
fervore kaj kun granda ĝoj'.

*Esto perenne mentibus
paschale, Iesu, gaudium,
et nos renatos gratiæ
tuis triumphis aggrega.*

Vi estu do al nia mens',
Jesu', ĉiama paska ĝoj'.
Vi naskis novaj nin el grac':
triumfi igu nin kun Vi.

*Iesu, tibi sit gloria,
qui morte victa prænitens,
cum Patre et almo Spiritu,
in sempiterna sæcula.*

Al Vi, Jesuo, estu glor',
post Via venko brilas Vi
kun Viaj Patro kaj Spirit',
tra ĉiuj tempo kaj eon'.

Amen.

Amen.

latina T: nekonata verkinto

E: Albrecht Kronenberger 2008